

Rasismo, 3-a parto

Claude Gacond, 63-a radioprelego, 1964.02.12 & 15

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la rasismo. Parolas Claude Gacond.

Dum la du pasintaj elsendoj mi prezentis al vi la verkon de John Howard Griffin *En la haŭto de nigrulo*. Mi rememorigas al vi, ke temis pri kuraĝa aventuro de blanka psikiatro. Per speciala kuracilo li povis nigrigi sian haŭton kaj dum ses semajnoj li fariĝis vera nigrulo, kiu serĉas laboron en Suda Usono. Mi rakontis al vi dramajn momentojn de tiu eksperimento, kiu certe faris pli kontraŭ la rasapartigo, ol centoj da sciencaj raportoj.

Kiam homoj suferegas pro maljustaĵoj, ili silentas. De loko al loko aŭdiĝas malesperaj krioj, sed la suferantoj ne kuraĝas diskonigi la suferitaĵojn, tio pro homa deco kaj pro timo poste ankoraŭ pli suferi. Nur personoj eksteraj al la konflikto, kiuj kun kuraĝo sin trudas inter la suferantojn kaj la suferigantojn, kaj kiuj poste diskonigas siajn travivaĵojn, per gazetartikoloj aŭ verkado de libro, havas sufiĉe grandan moralan povon por diskonigi okazaĵojn, kiujn ĉiuj suspektas, sed pri kiuj neniuj kuraĝas paroli.

En Usono John Howard Griffin ĵus ludis tiun ĉi rolon. Dank'al sia artefarita nigruliĝo li povis rikolti sciigojn, kiujn neniuj blankulo povus rikolti. Poste, refariĝinte blankulo, li havis nur unu moralan devon: diskonigi siajn sciojn. Vi povas pensi, ke tiu diskonigo ne estis sen danĝero: anonimaj telefonaj minacoj venenis lian familian vivon kaj devigis lin translokiĝi en alian regionon de Usono. Aĉaj rasistoj pendigis lian figuraĵon meze de lia urbo kun mort-minacoj. Multaj el liaj konatoj ne plu kuraĝis saluti lin. Jen la dornkrono, kiu aŭreolas tre ofte la serĉantojn de la vero. La danĝero estas, ke ofte la dornoj mort-pikas la kroniton.

Sed s-ro Griffin ankaŭ diras, ke multaj leteroj inundis lian leterujon post la apero de liaj unuaj artikoloj por lin gratuli pri lia kuraĝo. El 6000 leteroj ricevitaĵoj en la unuaj tagoj nur 9 estis insultaj, ĉiuj aliaj estis kuraĝigaj. Kaj multaj el tiuj leteroj estis skribitaj de blankuloj loĝantaj en la Sudo de Usono. Ili diris sian naŭzon de la rasapartigo kaj sian deziron vidi plej rapide plenan solviĝon de tiu problemo, kiu venenigas la socian vivon de lando, kiu sin proklamas demokrata.

La libro de s-ro Griffin *En la haŭto de nigrulo* ne nur helpas la blankulojn revizii sian sintenon rilate siajn nigrajn fratojn, ĝi ankaŭ helpas la nigrulojn en sia rezisto al la nehomaj kaj maldecaj rasapartigaj kutimoj.

S-ro Griffin pilgrimis sub sia nigra aspekto en diversaj urboj. Li priskribas la mankon de agad-unueco de la nigruloj. De sia trapaso en la gettoj li komprenis la duecon de la problemoj de la nigruloj. Ekzistas du specoj de rasapartigo ; tiu, kiun perfektigis la blankuloj, kaj tiu, kiun la nigruloj trudas al si kiel punon. La nigrulo malestimas sian nigrecon, kiun li asocias al siaj suferoj. De tiu sento naskiĝis bezono malutili al siaj nigraj kunsuferantoj. Ĉar li suferas de sia nigreco, li humiligas per siaj sinteno kaj diroj la kamaradojn, kies haŭto estas pli nigra, ol la lia, aŭ kies socia pozicio estas malpli alta. Kreiĝis speco de hierarkio bazita sur la koloro de la haŭto. Tiom longe, kiam daŭros tiu sinteno, tiam mankos al la nigrularo la necesa forto, kiu povas devigi la blankularon ŝanĝi sian ras-sintenon.

Sed s-ro Griffin, dum sia trapaso en Montgomery, la ĉefurbo de Alabama, trovis alian atmosferon. Tie ekzistis grupa sinteno. La malespero estas anstataŭata de nehaltigebla decido rezisti neperforte al ĉiuj maljustaĵoj. Tio estas la influo de estro, de la reverendo Martin Luther King Junulo, tiu nigra Gandhi, kiu en klimato de preĝo alvokas sian popolon al paca rezistado al la apartigado. En tiu urbo ĉiu nigrulo elektis sian pozicion post meditado. Li plej ofte decidis iri ĝis la malliberigo por atingi sian celon. Lia agadmetodo estos stoike nerespondi al la insultoj kaj troigoj de la rasistoj kaj rifuzi obeadon al la kutimoj kaj leĝoj de la rasapartigo, por ke iun tagon liaj infanoj ne plu konu la inferon de la rasapartigo.

Rasismo, 3-a parto
Claude Gacond, 63-a radioprelego, 1964.02.12 & 15

Tiu sinteno senarmigas kaj kolerigas la rasiston, tio ĉefe ĉar la digno de la sinteno de la nigrularo substrekas la maldignon de la blankularo. Ekzakte la saman reagon havis la britaj koloniistoj dum la neperforta rezistado de la hindoj. Por Gandhi neperforto estas forto, kiu superas ĉiun ajn perforton. Neperforto, aŭ pli bone satjagraho, estas la forto de la vero, de la bono, kontraŭ la persona egoismo kaj malbono. Por Gandhi satjagraho estas eĉ pli ol forto, ĝi estas scienco aŭ vividealo. Por li tiu scienco alportas la solvon al la problemoj, kiuj dividas la homojn.

La omaĝo de s-ro Griffin al la konstruiga influo de pastoro Martin Luther King estas averto. Averti al la Klu-Kluks-Klananoj, ke ilia potenco estas venkata. Averti ankaŭ al ĉiuj homoj de la mondo, ke la erao de la privilegioj estas mortanta.

Ke la voĉo de la nigra Gandhi povis esti aŭdata en Usono, tio estas rebato al la diro, ke satjagraho nur konvenis al orientanoj. Ni hodiaŭ vidas popolon el Okcidento, sub la gvido de Martin Luther King, repreni la malfacilan vojon de la amo al la malamiko. Gandhi gvidis sian popolon al la sendependiĝo sen verŝo de sango. Povu King gvidi la usonajn nigrulojn kaj blankulojn al refratiĝo sen verŝo de sango. Tio estus granda venko tuthomara kontraŭ la malbono.

Per tiu elsendo ni finis serion de tri prelegoj pri la rasismo kaj pri la libro *En la haŭto de nigrulo* de John Howard Griffin. Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-